

**Helmar  
Gunter  
FRANK**

:

Germanujo

Helmar Gunter FRANK (19. 2. 1933 – 15. 12. 2013)

Frank studis matematikon, fizikon kaj filozofion en Stuttgart, Tübingen kaj Parizo, doktoriĝis pri filozofio kaj habilitiĝis pri kibernetika pedagogio. 1963, tridekjaraĝa, li iĝis profesoro de la Pedagogia Altlernejo en Berlino kaj fondis tie Kibernetikan Instituton, kie, kun subteno de Konrad Zuse (inventinto de komputilo), konstruiĝis instruaŭtomatoj. En 1970, pro kunlaboro kun Heinz Nixdorf, siatempe unu el mondgrandaj produktantoj de komputiloj, Frank transiris al Paderborn por gvidi esplorcentron pri objektigita instruado. Tiu poste enkorpiĝis en la Universitaton Paderborn, kiun Frank kunfondis. Li estris tiean Klerigkibernetikan Instituton kiel orda profesoro ekde 1972 ĝis sia malsaniĝo en 2006. Ekde tiam ĝis la forpaso li vivis en flegejo.

Frank apartenas al pioniraj komunikadkibernetikaj sciencistoj, li lanĉis kibernetikan informaci-psikologion kaj klerigkibernetikon, kunfondis informaci-estetikon kaj lingvokibernetikon. Li estas honora profesoro de universitatoj en Berlino, Klagenfurt, Linz, Prago, Nitra, Sibiu, Moskvo, São Paŭlo, San Salvador, Buenos Aires, Rosario kaj Guangzhou, honorprezidanto de pluraj germanaj kaj internaciaj fakaj organizaĵoj, aŭtoro de kelkcent sciencaj artikoloj kaj libroj.

Li ricevis plurajn internaciajn honorigojn kaj la unuaklasan meritkrucon de la Federacia Respubliko Germanio. Krome li politike aktivis: kiel membro de germana liberalisma partio (FDP) li dufoje kandidatiĝis por Eŭropa Parlamento.

Esperanton li ellernis en Paderborn, kie estis “Esperanto-Centro” kun granda librejo de Hermann Behrmann. Frank aprezis lernfacilecon kaj “algoritmecon” de la lingvo, kiun li opiniis taŭga propedeŭtiko por instruado de fremdlingvoj anstataŭ plifruigo de la instruado de la Angla. Konatiĝinte kun István Szerdahelyi, li informiĝis pri Esperantaj propedeŭtikaj eksperimentoj kaj mem organizis 1975-1984 por sescent infanoj “Lingvoorientigan instruadon”, kies pozitivajn rezultojn li mezuris per propraj klerigkibernetikaj metodoj. Propagado de Esperanto kiel unua fremdlingvo en Eŭropo iĝis parto de lingvopolitika laboro de Frank, precipe en “Eŭropa Klubo”

(1974-2009), kiun li kunfondis kun la celo kontribui al lingva samrajteco de Eŭropo, kaj en politika liberalisma klubo "ALEUS", prezanta la neŭtralecon de la internacia lingvo. Pro iniciato de Frank iĝis Esperanto ankaŭ unu de la laborlingvoj de "Association Internationale de Cybernétique" (AIC) kaj unu el la publikaĵlingvoj de la revuo « grkg/Humankybernetik ».

La ideon de neŭtrala kaj facila internacia lingvo por sciencistoj sekvis Frank kiel iniciatinto kaj prezidinto (1983-2007) de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS). Ĝi promocias esploradon kaj kleriĝon en ĉiuj sciencaj kampoj kaj ebligas vastan internacian kunlaboron ĉu de unuopaj sciencistoj, ĉu de universitatoj, uzante, laŭstatute, kiel laborlingvon la Internacian Lingvon (ILo). Kiel tia rolas Esperanto, sendube la plej granda neŭtrala internacia lingvo. En Esperanto okazas instruado dum AIS-studadsesioj kaj en AIS-klerigejoj, en paralelaj naciligva kaj Esperanta versioj estas skribataj diplombolabroĵoj kaj sciencaj verkoj de akademianoj, en Esperanto publikiĝas "Acta Sanmarinensia".

Frank partoprenis, krom en 2004, en ĉiuj UK de UEA inter 1974 – 2006, multfoje kiel preleganto. 1990 li prezidis la Internacian Kongresan Universitaton en Kubo. En 2004 li estis elektita "Esperantisto de la Jaro". Ankaŭ liaj familianoj estas aktivaj esperantistoj, lia filino Michaela estas E-denaskulino.

kp.: [http://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar\\_Frank](http://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar_Frank)

Tiu ĉi teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita (<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/deed.eo>)

Vera Barandowska por la panteono de [www.eduakdo.net](http://www.eduakdo.net), novembro 2010.